


KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 311 (78) KVINA EPOKO

JUNIO 2000

PRIDEBATA	
RENKONTIĜO	2
NIA AGADO	3
NIA FORUMO	4
EŬROPA	
ANGULO	8
INTERNACIE	10
RECENZOJ	12



2000 INTERNACIA JARO
POR LA KULTURO DE PACO



ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de UEA, FEL, *Literatura Foiro*, IKEL, *La Kancerkliniko*, *La Dua Jarcento (IEM)*, *La Ondo de Esperanto* (peras aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

Ret - adreso: kea@stel.net

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 2000: Individua Abonanta Membro 3.500 p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Neus Moly; Vicprezidanto: Josep Franquesa; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; kasisto: Llibert Puig; Komitatanoj: Lluís Aragay, Mercè Porta, Luz Vázquez, Sun Farràs, Roger Prieto.

Kontrola Komisiono: Miquel A. Altuna, Arnald Massanas, Lluís Armadans

Kataluna Esperantisto: Pere Bernús, Llibert Puig, Marina Ollé, Pako Belmonte

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

DEBATO ASOCIA REORGANIZO

Laŭcele reliefigi la finan debatkunvenon, la estraro de KEA proponas al siaj membroj renkontiĝi en restadejo surmontara, kie krom trankvileco ni spiros sanan aeron kaj tio certe helpos trovi la plej bonajn proponojn kaj konkludojn.

Ni proponas la semajnfinojn 21-22 de oktobro ĉi jara ĉe la restadejo "Mas Cabàlies" en Ogassa (tute proksime al Sant Joan de les Abadesses) facile atingebla veturile. Trajne ĝis Ripoll (fervojlino Barcelono-Puigcerdà) kaj en la stacidomo ni atendos kaj veturigos vin ĝis la restadejo.

Ni antaŭvidis unu solan kompletan pensionon, ekde sabata vespermanĝo ĝis dimanĉa tagmanĝo kiu kostas 3.000 p-tojn (krom hejtado se necese, kio maksimume kostos po 200 p-toj). Kun la manĝoj oni servas akvon kaj oni devas aparte pagi ĉiujn deziratajn trinkaĵojn.

Oni devos tranokti en komunaj ĉambroj 8 kaj 10-litaj, tamen se tuj menditaj ni disponos pri unu ĉambro 4-lita kaj alia 6-lita, eventuale por plenaĝuloj aŭ familioj kun infanoj.

Laŭ provizora programo ni antaŭvidas unuan kunvenon sabate je la 18-a h. ĝis la vespermanĝo okazonta je la 20-a h. prok.

Post la vespermanĝo ni proponas distran vesperon laŭ propraj rimedoj kaj tiucele ni instigas la muzikistojn de nia teamo **Kaj Tiel Plu** al kunlaboro.

Kunvenoj daŭrigos dimanĉe matene ĝis la 14-a h. por tagmanĝi kaj adiaŭo.

Nepre decidu vian partoprenon plej rapide kaj aliĝu per telefono al n-ro 93-7109636, fakse al n-ro 93-716.3633 aŭ trarete al la jena adreso: kea-kasisto@esperanto.ct.org.

Konfirminte vian aliĝon ni enspezos al vi trabanke la koston de la restado, tio estas: 3.000 p-tojn. Eventualajn aldonadojn vi pagos surloke.

HELPO POLA

ESPERANTISTINO

Reage al nia alvoko sur nia lasta revuo, alvenis ĝis nun jenaj donacoj:

Josep Ferrer - Barcelono	10.000 p-toj
Pere Julià - Ciutat Mallorca	10.000 "
Llibert Puig - Sabadell	5.000 "
Èric Collignon	5.000 "

Elkoran dankon al ĉiuj ĝisnunaj kaj estontaj donacemuloj.

KONSULTA KOMITATO DE UNESKO POR LINGVA PLURECO KAJ MULTLINGVA EDUKO

Nia membro Prof. Lluís de Yzaguirre reprezentis UEA en kunveno de la Konsulta Komitato de Unesko por Lingva Plureco kaj Multlingva Eduko okazinta en Barcelono inter la 24-a kaj 26-a de februaro 2000. Jen resumo de lia raporto (el la revuo *Esperanto* aprilo 2000)

Post paroladoj i.a. de komitat-estro Félix Martí kaj de Carlos Spottorno, gvidando de la hispana Unesko-komisiono, invititoj prezentis plurajn projektojn. Paul Ortega, direktoro de Unesko-Centro en Eŭskio, priparolis la Unesko-raporton "La lingvoj de la mondo", kiu ricevis jam respondojn pri ĉ.500 lingvoj. Laŭ Carles Torner, estro de komisiono de Internacia PEN pri tradukado kaj lingvaj rajtoj, la Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj (1996; vidu dec.98.p.206) kaj submetita al Unesko por aprobo, ne estis ŝatata de pluraj ties delegacioj aŭ funkciuloj.

En sia fina raporto la komitato rekomendas i.a. ke Unesko engaĝiĝu en la "pensado pri lingvorilataj homrajtoj" kaj "favoru la evoluigon de multlingvaj iloj", studante "la efikon de novaj lingvaj teknologioj sur la lingvo-diversecon".

Kiel kutime en similaj okazoj, gravis "koridoraj kontaktoj", . Prof. Yzaguirre-lingvisto scipovanta E-on pro scienca intereso, sed ne movadano-povis ofte neformale klarigi sian altan takson pri Esperanto. Li konkludas ke UEA bezonas ian "kvinan kolonon" de lingvistoj kapablaj je pure scienca argumentado. Inter liaj ceteraj rekomendoj estas ke UEA atente sekvu la laborojn de ĉi tiu komitato kaj studu la projekton Perikles pri translima interkonatiĝo, proponante eksperimentojn en ŝtatlimaj regionoj kie kunestas pli ol du lingvoj. UEA povus helpi al Unesko per ideoj por la Internacia Tago de la Patrino lingvo (21 feb.) kaj la Tago de la Lingvoj Malpli Uzataj (15 apr.)

LA VERKO DE LA JARO 1999

La abonantaro de *Literatura Foiro* aljuĝis per referendumo la premion *La verko de la Jaro 1999*, ĉi-foje rezervita al poezia libro. Gajnis *Karnavale* de Abel Montagut, eldonita ĉe IEM en Vieno.

Gimnazia instruisto, membro de la Kataluna PEN-Centro, Abel Montagut estis la lasta sekretario de la Internaciaj Floraj Ludoj. Li aŭtoris ankaŭ *Poemon de Utnoa*.

Ĉi-jare kandidatis nur du pliaj titoloj: *Sur Parnaso* de Timotny Brian Carr kaj *Moskvaro*

de Valentin Melnikov, Klara Ilutoviĉ, Solomon Vysokovskij kaj Oĉjo Dadaev. Ilin indikis la membroj de Esperanta PEN-Centro.

Ankaŭ en 1997 gajnis poemaro de iberiano, Miguel Fernández. La organizadon prizorgis Sino Mari-Roza Vilain-De Wolf, estrino de la konkursfako de LF-koop. **HeKo**.

(El *La Ondo de Esperanto* n-ro 6/2000)

(Ni gratulas plej varme nian estimatan poetan membron)

RENKONTIĜO EN GRENOBLE

Dum la semajnfino 9-10 kaj 11 de septembro, okazos renkontiĝo en Grenoble (Francio) inter la tieaj kaj la katalunaj esperantistoj kun la celo transdoni la diplomon kaj medalon de la vjetnama registaro al la nepo de Felician Olivan, kunbatalanto kun la vjetnamoj kaj heroe mortinta tie dum ilia liberiga milito kontraŭ la usonanoj.

Nia estrarano Josep Franquesa ricevis la honorigaĵojn rekte de la vjetnama registaro dum la Dua Azia Kongreso kiu okazis tie dum aŭgusto 1999 kun la promeso serĉi plej rektajn parencojn kaj liveri al ili la objektojn.

Pri eventuala programo kaj kunvenloko ni informos ĉiujn kiuj antaŭvidas partopreni, kion en la nuna momento ni malhavas.

DEBATO PRI ASOCIA REORGANIZO

Dum la pasinta monato ni sendis al niaj membroj la du kajerojn kun ĉiuj ricevitaĵ mesaĝoj trarete kaj akompana letero de nia prezidantino kiu instigis la neretanojn ankaŭ alporti siajn sugestojn kaj proponojn ĝis la fino de junio. Post tiu limdato oni kompilos la tuton kaj prezentiĝos al fina debatkunveno okazonta en oktobro (vidu la anoncon de tiu kunveno sur paĝo dua).

PRI FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS

Ni memorigu al niaj junaj membroj ke Frederic Pujulà i Vallès estis unu el la plej elstaraj pioniroj kiu ege aktivis komence de la 20-a jarcento kaj prezidis la 5-an UK. okazonta en Barcelono en 1909. Ĵurnalisto kaj verkisto frekventis la artisman rondon ĉe la fama barcelona bierejo "Els Quatre Gats" kaj tie estis portretita de Picasso. Reprodukto de tiu portreto troviĝas en nia biblioteko-arkivo.

NIA FORUMO

La debatoj estas neimagebla fonto da ideoj ne nur pri la plibonigo de nia asocia agado, sed ankaŭ pri aliaj sociaj problemoj kiuj ekzistas kaj atendas solvon ankaŭ de ni esperantistoj, ĉar ni estas ankaŭ en tiu ĉi reala mondo, ne nur en tiu idilia de Esperantio.

La debato pri la reorganizo de nia asocio KEA, kiu startis en Manresa, sekvis trarete kaj sekvas inter nia eksterreta membraro ĝis la 30-a de junio, sekvos ankoraŭ en posta kunveno por ordigi kaj proponi al la estraro la eventualajn efektivegeblajn iniciatojn. (Pri ĝi legu ankoraŭ aparte en la rubriko *Nia Agado*).

Lanĉi ĉi tiun forumon, al kiu ni invitas niajn membrojn, provokis la tri jenaj pensigaj tekstoj kiujn ni ĵus ricevis.

Teksto A

Jen fragmento el la rakonto de Robert Silverberg: *Ŝvarc inter la Galaksioj*, aperinta en numero 7 de la scienfika kolekto Sferoj:

“Estas tute same ĉie ajn. En ununura jarcento, ni transformis la planedon en unu gigantan evoluantan plastan okcidentan industrian ŝtaton. La relaksaj televidaj satelitoj, la du horaj kontinentoj, raketoj, la diseriĝo de religia ekskluziveco kaj gena tabuo, jam forrabis de ĉiu kulturo ties purrusecon, ĉu vi ne vidas? Oni vizitas zuniojn kaj ili havas plastajn afrikajn maskojn surmure. Oni vizitas boŝmanojn kaj ili havas cindruojn kun hopiaj motivoj, faritajn en Japanio..”

“Kultura diverseco jam foriris de la mondo... kie troviĝas la navahoj nuntempe? Iru al Arizono kaj ili ĉantos por vi, jes, laŭ sia tarifo, kaj verŝajne la kantistoj estas nur kvarone navahaj, aŭ okone, aŭ eble nur hopioj dungitaj..”

Kiome valoras la peno spekulii pri la estonteco? Prognozoj, statistikoj, profetaĵoj, tendencoj... estas interese aŭ amuze ilin koni, sed la danĝero estas permesi ke ili misinfluu al nia celaro. Arbo kreskas laŭ sia naturo sendepende ĉu ĝi estos fruktodona aŭ forhakita. Per tio mi ne pretendas stultblinde ignori la studojn de scienculoj. Laŭ mi, ni devas formangi la asertojn de tiaj saĝuloj kaj lasi ke nia korpo elsuĉu la profitan parton de la diraĵoj kaj kraĉu la nenecesan.

Arbaroj, ozono, specioj kaj lingvoj malaperas. Militoj multobliĝas, same kiel la distanco inter riĉuloj kaj malriĉuloj. Kiu aŭ kia devas esti nia konkludo?

Eble ni tro kroĉas nin al Esperanto kiel vivsenco forgesante ke, tio kio vere gravas estas la sento aŭ sinteno kiu kondukis nin ĝis Esperanto, kaj tiun senton neniam povos dependi de prognozo, almenaŭ ne sen nia konsento.

Ĉu ni fartus pli bone lernante la anglan aŭ la hispanan? Mi vere dubas. Eĉ se malgrandskale, Esperanto kaj la esperantistoj kontribuas en la evoluo de la mondsocio. Esperanto kunligas homojn kiuj kune plifortikigas kelkajn valorojn.

Ja eblas ke la mondo unuformiĝos, ne nur lingve, sed tio, se prave, signifas ke ni estas privilegiuloj kiuj ankoraŭ (dum nia tuta vivodaŭro) ĝuos ĝardenon de diverseco.

Ni elradikigu ĉiun maskitan finvenkisman de nia sentokorpo.

Salute via

Karles (Carles Berga)

16.05.2000

Teksto B

PARTOPRENI EN EVENTOJ (MOVADA STRATEGIO)

La nuntempo kiun ni vivas estas la epoko de mirakla materia progreso kiun nia civilizo ankoraŭ ne spertis. Ĉirkaŭ ni okazas tre dinamisma evoluo: ekonomia kresko, teknologia progreso, komunikaj atingoj, novaj kulturaj agadoj, spektaklaj sciencaj esploroj. Sed en la sama moderna mondo okazas ankaŭ ideologiaj kaj politikaj krizoj, konfliktoj kaj militoj, naturaj katastrofoj kaj sociaj kataklismoj-okazas historio.

Nur lastatempe antaŭ niaj okuloj malaperis socialisma bloko, disfalis soveta imperio, okazis genocidaj militoj en Bosnio, Ĉeĉenio kaj Ruando, civilaj militoj en Afganio kaj Gvatemalo, tertremoj

en Japanio kaj Meksikio, inundegoj en Filipinoj kaj Italio, epidemioj en Afriko, Azio kaj Latinameriko, rifuĝintaj krizoj en Eŭropo kaj Usono.

Kaj se ne ĉiuj homoj povas aŭ ne devas samgrade ĝui prosperon de ekonomia kaj teknologia progreso, la sociaj kaj naturaj kataklismoj trafas ĉiun homon egale senkonsidere ĝian rasan, etnan aŭ religian apartenon kaj socian pozicion.

Ekagi en mondaj katastrofoj

La katastrofoj tamen ne estas nova fenomeno por nia civilizo. La moderna internacia komunumo disvolvis efikajn strukturojn por agadi kaj tuj reagi en ili. Sur tutgloba plano temas pri UNO kaj ĝia sistemo, en aliaj mondregionoj pri ties regionaj grupiĝoj kaj iliaj sistemoj.

En genocidaj kaj civilaj militoj, en tertremoj kaj inundegoj, en epidemioj kaj socialaj krizoj tuj ekagas tuta ĉenaro de interŝtataj humanitaraj organizoj kiuj apartenas al la supre menciitaj politikaj grupiĝoj, sed ekagas samtempe ankaŭ multege pli da aliaj ŝtataj, privataj, kooperativaj, internaciaj, landaj, lokaj, religiaj, fakaj, diversasociaj humanitaraj kaj bonfaraj organizoj, servoj kaj agentejoj.

Ĉiuj ili aktiviĝas por trovi bonfaremajn ŝtatojn, kompaniojn, ekleziojn, entreprenojn kaj aliajn financajn fontojn filantropojn, mecenatojn kaj individuojn kiuj pretas helpi en la krizo-ili proponas sin por peri la helpon. Sed ankaŭ inverse, la neregistarajn humanitarajn organizojn serĉas potencaj financaj strukturoj de interŝtataj organizaĵoj (ekzemple, UNHCR-Alta Komisaro por Rifuĝintoj de UN, ECHO-Humanitara Ofcejo de Eŭropa Komisiono) kaj diversaj aliaj bonfaremaj subjektoj por pere de ili realigi plurajn gravajn humanitarajn projektojn, pezaj multajn milionojn da dolaroj.

“Kuracistoj sen limoj”, “Konstruistoj sen limoj”, “Beataj packonstruantoj” aŭ eĉ “Klaŭnoj sen limoj”, por mencii nur kelkajn, urĝas al ĉiuj anguloj de la mondo por oferti siajn servojn.

La E-movado paralize “neŭtralas”

Sed kion faras la E-movado en tiuj eventoj? Ĝi troviĝas rande de la mondo, eĉ ekster la reala mondo, en siaspeca memizoliĝo. Ĝi persiste klopodas per teoriaj pledoj, tute moralaj el vidpunkto de lingva dimensio de socia vivo, instrui la mondon pri “lingvaj rajtoj”, “lingva demokratio” aŭ eĉ “kulturo de la paco”.

Dum ĉiuj aliaj sociaj agantoj febre urĝas al krizejoj, niaj estraranoj kaj direktoroj el siaj “neŭtralaj”, centraj oficejoj predikas pri la “monda lingvo-problemo” aŭ, se ili entute komentas la aferojn, ili mesaĝas ke la interveno multe malpli kostus se la intervenemuloj trapasus unue la E-kursojn laŭ “tendara aŭ zagreba-metodo”.

Ili ne mobilizas siajn taĉmentojn de “Esperantistoj sen limoj” aŭ de “Beataj esperantistoj”, ĉar ĝis nun ili ne sukcesis krei tian strukturon, sian organizon kiu saltados de unu al alia mondoparto, al krizfokusejoj de la mondo por proponi siajn humanitarajn servojn al kiu ajn homo, al kiu ajn popolo, al kiu ajn “flanko”, kiel ofte kutimas malice diri la mondpolitikistoj.

Ili ne ofertas al UNHCR aŭ ECHO siajn eblecojn por ties multekostaj projektoj. Anstataŭ pledoj ĉe triarangaj oficistoj tra la oficejoj de UNO kaj Eŭropa Unio por “lingva egaleco”, ili ne lobias ĉe ties adekvataj funkciuloj ke fine “Esperantistoj sen limoj” transprenu realigon de certa projekto en Bosnio, Ugando, Gvatemalo aŭ Kamboĝo. Ili ne konscias se subite al la “Esperantistoj sen limoj” oni fidus almenaŭ unu el la projektoj, ke la Internacia Lingvo tuj ricevos sencon, ĝi akirus gravan eksteran prestiĝon, oni aŭtomate altigus kaj idean kaj organizan kaj financan (!) nivelon de la E-movado – oni fakte vivus en la reala mondo kaj oni eĉ havus ŝanceton influi la internacian vivon.

Sed en la mondo ne okazas nur humanitaraj krizoj. En ĝi okazas ankaŭ ekonomia progreso, kulturaj interŝanĝoj, novaj teknologioj, sportaj eventoj... En ĉiuj tiuj sferoj de internacia vivo ekzistas adekvataj strukturoj kiujn nepre utilas ekkoni, malkovri ilian funkciadon kaj kunagadi kun ili.

Partopreni en eventoj estas baza premiso – kaj defio – de kiu ajn serioza movada strategio.

Senad Colic

(El revuo Bosnia Lilio n-ro 3 (1/1999) jaro 3)

NIA FORUMO

Teksto C

La jena teksto estas projekto de Andrea Chiti-Batelli pri manifesto de eŭropaj intelektuloj. Ĝi povus esti bazo por "Prezento de motivoj" aldonota al la Peticio por "Konstanta Konferenco pri la lingva problemo en Eŭropa ŭnio".

POR PREVENTI LINGVAN ĈERNOBILON

I

Ankoraŭ malgranda sed daŭre kreskanta nombro da spertuloj, da fakuloj, da lingvistoj avertas kontraŭ kreskanta kaj jam proksime minacanta danĝero, kiun estigas al niaj lingvoj la ĉiam pli dominanta pozicio de la angla lingvo kiel eŭropa kaj tutmonda *lingua franca*: t.e. ne nur progresiva modifiĝo de tiuj idiomoj, sed ties progresiva detruigo ĝis transformiĝo al mortintaj lingvoj. La plej malfortaj kaj malplej parolataj el tiuj, prognozas tiuj spertuloj, ne vidos, plej optimisme, la naskiĝon de la 22-a jarcento. La ceteraj – rebus sic stantibus- sekvos je mallonga tempdistanco.

II

La situacio estas aparte grava pro tri kialoj.

La unua estas ke lingvo ne estas nura komunikilo, sed estas portanto de kulturo, kiu ne povas vivisen ĝi: tial ankaŭ kulturoj kaj vivmanieroj, kaj precipe tiuj de la Malnova Kontinento, kies spirita riĉeco konsistas el ilia plureco – la esenco mem de la eŭropa "identeco"- riskas lingvan Ĉernobilon. La dua estas ke en nia kazo la fenomeno okazas laŭgrade, sen ke la plej multaj rimarkus kaj do reagus al ĝi. Tiel okazis pri lapoluado-de la tero, de la akvo, de la aero-kies denuncado je la komenco ŝajnis fiksa ideo de kelkaj unumaniuloj, tiel ke la socio tro malfrue ekkonsciis pri tio, kiam jam multaj damaĝoj estis jam neinvertigeblaj, multaj naturaj kaj artaj belaĵoj estis neripareble detruitaj, multaj vegetaĵaj kaj animalaj specioj estis malaperintaj. Hodiaŭ la sama malprudenta nekredemo estas kontraŭmetata fare de tro multaj al tiuj, kiuj rimarkas, ke same kreskanta kaj same detrua poluado minacas niajn lingvojn.

La tria kialo, kaj la plej granda obstaklo al efektiva prevento de tiu danĝero, konsistas en tio, ke eĉ la malplimulto de la pli atentaj studentoj pri la diakronaj fenomenoj kaj pri ilia hodiaŭa progresiva plirapidiĝo proponas solvojn-ĝenerale la plurlingvismon-tute neadekvatajn porforigi la anglalingvan minacon. Vere la ellernado de pluraj lingvoj unuflanke estas neatingebla de la plej multaj, kaj restas esenca objektivo nur por kleruloj; aliflanke ĝi ne solvas la problemon de la internacia komunikado: ununura komunika lingvo estas ĉiam pli urĝa postulo de socio ĉiam pli "tutmondigita", tiel ke estas vane kontraŭstari la historian iradon.

III

La situacio interne de la Eŭropa Unio konfirmas la gravecon de la danĝero. En la kampo de la komunaj institucioj la daŭra plimultiĝo de la membroj, kaj do de la lingvoj de la Unio, kaŭzas ke ilia oficiala egalrajteco estu pli kaj pli nur laŭnoma, kaj en la praktiko ĝin anstataŭu la uzado de du aŭ tri lingvoj pli gravaj-la franca, la germana, la angla-, kun progresiva superregado de ĉi lasta. Eĉ pli grava estas tamen la situacio en la kultura kampo. Kiam jam laplej gravaj sciencaj revuoj, precipe en la tereno de la nehumanismaj disciplinoj, publikiĝas en la angla, kaj ĉiam pli ofte oni konsilas al la diverslandaj studentoj verki en la angla siajn disertaciojn rilatajn al tiuj fakoj, ne estas troigite aserti ke la estonteco jam komenciĝis kaj ke jam hodiaŭ niaj lingvoj estas transformiĝantaj al dialektoj, per kies uzado estos ĉiam pli malfacile komunikadi sciencnivele.

Tio estas ĝuste la antaŭĉambro de la estingiĝo. Kaj la estingiĝo de la lingvoj kaj de la kulturoj, favore al mizera universala anglalingveco, kompromitas mem la unuecoj kaj la politikan sendependecon de la Malnova Kontinento.

IV

Ĉar la konscio pri la danĝero ankoraŭ tro malgrandas, la pripensado pri la problemo nesufiĉas kaj la sugestataj solvoj estas direktitaj tre pli al la simptomoj ol al la kaŭzoj, kaj do havas malmultan aŭ tute nenian efikon, do ni proponas al la reprezentantoj de la kulturo, al la politikistoj, al la registoj, al la eŭropistaj organizaĵoj, ke ili fariĝu iniciatantoj de Konferenco pri la eŭropaj lingvoj kaj pri ilia defendo kaj antaŭenigo, organizota de la Eŭropa Parlamento kaj de la institucioj de E.-U.-nome Konferenco kiu kunvenu ĉiujare, prefere en la sama urbo kaj je fiksita dato-por debati la problemon kaj atente studi, kaj proponi, ne iluzion solvon.

Estas evidente-preskaŭ estas superflue diri tion-ke tiu Konferenco devos esti malfermita al ĉiuj voĉoj kaj al ĉiuj solvoj sen ia ajn ekskludo. Sed la partoprenantoj devus almenaŭ esti klare konsciaj-tio estas nia konvinko-pri tio ke:

-la danĝero estas grava kaj proksime minacanta;

-ĉiukaze internacia komunika lingvo (lingua franca) sukcesas nur se subtenata de internacia potenco: serioza alternativo al la angla lingvo-kia ajn ĝi estu-iras do tra la realiĝo de politika Eŭropo;

-la tempo laboras kontraŭ tia realiĝo, kaj necesas do duobligi la fortostreĉojn por atingi ĝin kiel eble plej baldaŭ

De tio ĉi dependas la estonteco de la Malnova Kontinento, kaj tute aparte la pluvivado de la eŭropa kulturo kaj de la diversaj lingvoj kaj vivmanieroj, kiuj konsistigas ĝian specifan karakterizon.

(El Eŭropa Bulteno n-ro 7, junio 2000)

Jen tri tekstoj kiujn ni proponas por debato. Bonvolu sendi viajn reagojn skribe aŭ trarete al nia redakcio antaŭ la 30-a de aŭgusto por aperigi ilin en nia venonta revuo.

KOTOPO

Temas pri internacia multkultura ejo en Liono (Francio) ĉe 14, rue René Leynaud- tel.33-(0) 472077549-fakso 33-(0)478396757-retadreso: kotopo@esperanto.org kaj TTT-paĝo: www.esperanto.org/internacia/kotopo; UEA-konto: KTPO-M.

Ĝi estas malfermata al la publiko ĉiuj mardoj, merkredoj kaj ĵaŭdoj de la 18-1 ĝis la 22-a h.kaj dum specifaj okazantaĵoj.

Kial Kotopo?

Ĉar por multaj, valoras ne nur la enlanda kaj uson-angla kulturoj sed ĉiuj aliaj tutmonde, ĉar kreskas la deziro pli bone koni ilin, ĉar tiuj kulturoj sin esprimas per multe da lingvoj, ĉar, apud la naciaj lingvoj, ekzistas Esperanto, ĉar ankaŭ Esperanto posedas jam propran kulturon, kvankam modestan. **Kotopo estas multkultura ejo.**

Ĉar la ĝenerala publiko estas ne-aŭ misinformata pri Esperanto, ĉar Esperanto bezonas montri ke ĝi vivas, ĉar des pli bone estas ke ĝi faras tion en publika loko, plurajn fojojn semajne, en granda urbo, ĉar multe da eventualaj esperantistoj ne venas al Esperanto ĉar Esperanto ne venas al ili. **Kotopo estas informejo pri Esperanto.**

Ĉar francoj kaj eksterlandanoj, ĉu studentoj, turistoj, rifuĝintoj aŭ gast-laboristoj, emas renkontiĝi, konatiĝi en amika etoso, ĉar pli facilas diskuti pri internacia komunikado, humanismo, interna ideo aŭ Pasporta Servo ĉe agrabla tablo ol dum surstrata varbado, ĉar jam ekzistas irlandaj puboj, alĝeriaj kafejoj, hindiaj restoracioj, afrikaj dancejoj, afganaj te-trinkejoj, do... **Kotopo estas trinkejo internaciema.**

Ĉar guto post guto, la akvo traboras eĉ la ŝtonon granitan... **Ekestis tiu aventuro nomata KoToPo**



EŬROPA ANGULO

Raporto pri la 4-a EEE-Kongreso en Ostende

De la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2000 okazis la kvara EEU (Eŭropa Esperanto-Unio)-kongreso en Oostende (Belgio) kun proksimume 330 aliĝintoj el 20 landoj. Tiu ĉi kongreso estis eksterordinara el diversaj vidpunktoj.

1. Ĝi havis 3 temojn, nome "Ekologio, ŝlosilo por la 3-a jarmilo", "Eŭropa Unio" kaj "Interkulture".

La ĉeftemo estis ekologio. Komitato Jean-Pain ĉeestis per belega informa budo kaj Frederik Van den Brande prizorgis prelegon. En la enirhalo estis ekspozicio de publikaĵoj pri ekologio el la EU-landoj. Parto de la kongresanoj biciklis al la ekologia centro en Oostende. Profesoro Orszach prelegis pri "Mastrumado de la akvo, analogio kun internacia komunikado" en la Eŭropa Parlamento (EP).

La dua temo "Interkulture" manifestiĝis per demonstracio de la projekto al lernejestroj en Oostende kaj dum la solena inaŭguro fare de Stefan MacGill en ĉeesto de aro da eminentuloj el la provincaj kaj urbaj instancoj, kiuj promesis subteni ĝin.

Por preparoli la lingvajn problemojn de EU ni vizitis EPon kaj diskutis kun EPano Nell Maes. Pro parlamenta ferio aro da EPanoj, kiuj promesis partopreni, lastminute rezignis. Tie ankaŭ okazis debato pri la prelego, kiun Zlatko Tišljarić faris la antaŭan vesperon pri "Eŭropa identeco".

2. Ankaŭ eksterordinara estis la subteno de influhavaj personoj. La kongreso akiris la altan protekton de la belga reĝo. En la Honora Komitato de "Interkulture" estis 19 personoj, nome la tuta provinca estraro kaj la urbestro. En la Honora Listo de la kongreso estis 10 ministroj, i.a. la ĉefministro kaj 16 Epanoj.

3. Menciinda estas la nekutima subteno de publikaj instancoj: la lokaj instancoj kunlaboris en la preparoj de la kongreso per tabuloj kaj ŝildoj, senpage disponigis kongresejon, regalon, biciklojn, eniron de muzeo; lokaj komercistoj mendis 40 reklamojn en la dua bulteno kaj kongreslibro.

4. Sendube ankaŭ la eĥo ĉe la publiko en multvizitata populara banurbo estis nekutima: 40 flagoj kun la vorto *Esperanto* flirtis sur la kongreseja placo meze de la urbo, ĉe la kongresejo, ĉe diversaj butikoj kaj hoteloj, sur

la ekskursaj ŝipoj kaj ĉe la enirpordoj kie okazis la aliaj programeroj. La gazetaro raportis per grandaj artikoloj kun fotoj, la loka televido filmis du fojojn kaj okazis radiointervjuoj.

5. Plaĉa estis ankaŭ la kombino de la temoj kun turismado:

-la vizito al EP kombiniĝis kun busa kaj pieda ĉiĉeronado tra la urbo Bruselo kaj gvidataj vizitoj al la urbodomo;

-post prelego pri ekologia temo la partoprenantoj vizitis ekologian centron kaj Atlantikwall-muzeon;

-dum ŝipekskurso oni aŭdis prelegon pri "Delfenoj kaj balenoj en la Norda Maro" de Wimm De Smet, okazis forumo de la laborgrupo *Perspektivo* kaj la paro Robineau rakontis pri sia ok-jara vojaĝo tra la mondo.

Malforta flanko estis tro malgranda grupo da lokaj kunlaborantoj por gvidi la kongresanojn tra la programo.

Konklude mi pensas, ne la kongreso estos memorinda kaj havis aron da elementoj kiuj povus inspiri la organizantojn de la venontakongreso. La 5-a Kongreso okazos en 2002 en Verona.

Ivo Durwael

(El *l'Esperanto* n-ro 4/22 majo 2000)

REZOLUCIO

Por Konstanta Konferenco de Eŭropa Unio pri la Eŭropa Lingvo-Problemo.

I
La partoprenantoj en la 4-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso, kunvenintaj en Ostendo (Belgio) de la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2000,

konsiderante ke multobliĝis denuncoj fare de lingvistoj kaj de eminentaj kleruloj pri la riskoj de progresiva marĝeniĝo de niaj lingvoj favore al la angla lingvo;

konsiderante ke lingvo estas ne nur komunikilo, sed nepre necesa esprimilo de iu kulturo, kiu sen ĝi ne povas pluvivi;

prikalkulante do ke la dirita risko koncernas la eŭropan identecon mem, kies esenco kuŝas ĝuste en la plureco de la kulturoj de la Malnova Kontinento;

II
rimarkante krome ke la lingva reĝimo nuntempe reganta en E.U.-de laŭnoma egalrajteco de ĉiuj lingvoj-fariĝas des pli malfacila kaj multekosta ju pli kreskadas la

nombro de la lingvoj de la Unio, kaj tial tiu egalrajteco iĝas pli kaj pli nur ŝajna; prikalkulante fine ke, se la unuiĝo de Eŭropo antaŭeniros, kiel estas dezirinde, kaj pli kaj pli alprenos politikan dimension kaj supernacian strukturon, ĝi devos solvi en malpli neadekvata kaj neefika maniero ol okazas hodiaŭ la problemon de la intereŭropana komunikado;

III

konsiderinte ĉion ĉi, sugestas ke, pro iniciato de la aŭtoritatoj de E.U., kaj aparte de la Eŭropa Parlamento-la Unia institucio, kiu plej multe suferas la menciitajn lingvajn malfacilaĵojn-oni starigu Konstantan Konferencon pri la lingvoj, kiu prefere kunsidu ĉiujare en la sama urbo kaj je la sama dato, en kiu reprezentantoj de E.U. kaj de ĝiaj institucioj, naciaj politikistoj, lingvistoj, aparte kvalifikitaj kleruloj kaj fakuloj kaj reprezentantoj de la eŭropistaj organizaĵoj diskutu la lingvajn problemojn de Eŭropo kaj aparte tiun de la intereŭropana komunikado kaj proponu adekvatajn kaj ne iluziajn solvojn.

Ostendo, la 1-an de majo 2000.

(La supra rezolucio estu bazo de deklaro, kiun oni proponu por subskribo al *politikistoj* kaj al *eminentuloj en la kulturaj medioj* apoge al farota peticio celanta, ke la institucioj de Eŭropa Unio alfrontu la eŭropan lingvoproblemon surbaze de konkretaj donitaĵoj kaj priatentante diversajn vidpunktojn)

(El *l'Esperanto* n-ro 4/22 de majo 2000)

EŬROPA OFICEJO DE KONSCIENCŬJETO

Ni ricevis leteron per kiu oni informas nin ke de antaŭ ne multe ĉi oficejo translokiĝis el Bruselo al Barcelono. Samtempe oni sendis al ni la unuan kvarpaĝan bultenon de tiu asocio, redaktita entute en la angla. Ni gratulas la novan katalunan teamon kiu surprenis tiun respondecon kun la sincera deziro de la plej bonaj sukcesoj.

(Ni studas la aferon por proponi al ili pli justan lingvan egalrajtecon kaj la eblecon aldoni esperantlingvan resumon)

ILEI-ANGULO

La sekretario de ILEI-Cat Pedro M. Martin, sendas jenajn informojn de De Mauro La Torre, prezidanto de ILEI:

(1)

"Karaj ILEI-kunlaborantoj : Kiel vi supozeble scias, la 34-a ILEI KONFERENCO okazos en la E-Centro KVINPETALO en Bureso (Francujo) de la 15-a ĝis la 21-a de julio 2000. Antaŭvideble ĝi estos ne "oceana" kongreso (kiel UKE), sed pli "familieca" internacia renkontiĝo de E-instruistoj kaj instruantoj. La programo, nun precizigata, antaŭvidas: diskutrondojn, prelegojn, komitatkunsidojn, promenadojn, amuzojn, kulturaĵojn, ekskursojn. Pro nia ĝisnuna manko de sekretario, kaj pro nia "tradicia" moro aliĝi lastmomente, ni ankoraŭ ne klare scias, kiuj komitatanoj, komisiitoj kaj kunlaborantoj intencas ĉeesti. Tial la estraro **varme petas vin informi nin** (ankaŭ nur retmesaĝe) pri via intenco partopreni (aŭ ne) la ILEI-Konferencon, kaj kion vi scias pri viaj samlandaj aktivuloj.

Por informoj vi povas turniĝi rekte al la pri-Konferenca estraranino: Bishop, Jennifer jenny.bishop@education.monash.edu.au.

Por aliĝoj plej kompetentas la kasistino: Kim-Lindblom, Boo mee: boomee.kimlindblom@swipnet.se.

(2)

Finpretigante la programon por nia 34-a ILEI-Konferenco la estraro de ILEI estas diskutanta pri la plej taŭgaj temoj por la tieaj diskutrondoj. Jen listo da proponoj:

- A- La nuna stato de E-instruado en la lernejoj: lokaj normoj kaj faktoj.
- B- La rolo kaj disvastiĝo de E-instruado en Universitat-nivelaj instruejoj.
- C- Malĉeesta lernado de Esperanto: ekde korespondaj kursoj ĝis interagaj retpaĝaj kursoj.
- Ĉ- Nunaj kaj ontaj perspektivoj por projekto Interkulturo.
- D- Kunlaborado inter ILEI-sekcioj kaj Landaj Asocioj de UEA (kaj aliaj instru-celaj E-institucioj).
- E- Dezirinda estonteco por niaj Konferencoj, seminarioj, gimnazioj, ktp.
- F- Kunlaborado kun TEJO, Familia Rondo kaj Infanaj Kongresetoj.

Kion vi opinias pri la supre menciitaj proponoj? Ĉu vi havas kromajn?

Se vi ĉeestus la konferencon, kiun diskutrondon vi elektus?

(Se vi jam decidis partopreni en la Konferenco, aŭ se vi havas iun ajn sugeston aŭ proponon, bonvolu komuniki tion al Pedro M. Martin aŭ rekte al Mauro : m.latorre@uniroma3.it. Dankon)

INTERNACIE

2000 INTERNACIA JARO POR LA KULTURO DE PACO

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2000 la "Internacia Jaro por la Kulturo de Paco". Grupo da Nobel-pacpremiitoj projektis **Manifeston 2000** okaze de la priŝtado de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

MANIFESTO 2000 por kulturo de paco kaj senperforto

Aliĝu al la internacia movado por la kulturo de paco kaj senperforto

*Ĉar la jaro 2000 devas esti nova komenco, ŝanco por transformi-ĉiuj kune-la kulturon de milito kaj perforto en kulturon de paco kaj senperforto.

*Ĉar tiu transformado postulas partoprenon de ĉiu el ni kaj devas prezenti al gejunuloj kaj estontaj generacioj la valorojn, kiuj povas inspiri ilin krei mondon bazitan sur justeco, solidareco, libereco, digno, harmonio kaj prospero por ĉiuj.

*Ĉar la kulturo de paco povas fundamenti daŭripovan evoluon, protektadon de la medio kaj la bonfarton de ĉiu.

*Ĉar mi konscias pri mia parto de respondeco antaŭ la estonteco de la homaro, precipe antaŭ la hodiaŭaj kaj morgaŭaj infanoj.

Mi devontigas min en mia ĉiutaga vivo, mia familio, mia laboro, mia komunumo, mia lando kaj mia regiono:

1 "Respekti ĉiun vivon" Respekti la vivon kaj la dignon de ĉiu homo sen diskriminacio aŭ antaŭjuĝoj,

2 "Rifuzi perforton" Praktiki altivan senperforton, rifuzante perforton en ĉiuj ĝiaj formoj: fizika, seksa, psikologia, ekonomia kaj socia, precipe rilate al la plej malriĉaj kaj la plej vundeblaj kiel infanoj kaj adoleskuloj.

3 "Dividi kun aliaj" Kundividi miajn tempon kaj materiajn rimedojn, praktikante malavarecon por haltigi forpuŝadon, maljustecon kaj politikan kaj ekonomian subpremon.

4 "Aŭskulti por kompreni" Defendi la liberecon de esprimado kaj la kulturan diversecon, ĉiam preferante dialogi kaj aŭskulti, ne cedante je fanatikeco, mensogado kaj rifuzado de aliaj.

5 "Konservi la planedon" Favori respondecan konsumadon kaj evoluigon kiu respektas ĉiujn vivo-formojn kaj konservas la ekvilibron de la naturo sur nia planedo.

6 "Remalkovri solidarecon" Kontribui al la evoluo de mia komunumo, kun plena partopreno de virinoj kaj kun respekto de la demokratiaj principoj, por kune krei novajn formojn de solidareco.

DISKONIGU LA MESAĜON DE MANIFESTO 2000

Subskribu Manifeston 2000 en interreto: www.uea.org/2000.html

*Pro la grandega celo de tiu ĉi kampanjo –100 milionoj da subskriboj- la uzo de Interreto estas forte rekomendata por disvastigi la Manifeston 2000 kaj por kolekti subskribojn.

*Se vi ne havas rektan aliron al Interreto, eble vi povos ligiĝi al ĝi ĉe viaj geamikoj, bibliotekoj, lernejoj, universitatoj, urbodomoj kaj ciberkafejoj, aŭ ĉe la plej proksima oficejo de UN.

(La ne retanoj tamen povas sendi sian aliĝon al nia asocio telefone al 93-710.9636 aŭ fakse al 93-716.3633 ĝis la 15-a de aŭgusto kaj ni transsendos al UEA)

Ĉiuj subskriboj por MANIFESTO 2000 estos prezentitaj al la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en septembro 2000.

TUTMONDE

Ni ricevis la bultenon n-ro 8 (1/2000) de ĉi tiu asocio, kies ĉefartikolo titoliĝas Tutmonde ĉesos aktivecojn post agado 15-jara. Malgraŭ la financaj lastatempaj problemoj, la ĉefa kaŭzo de tiu decido baziĝas en la fakto ke la du ĉefaj gvidantoj Marcel Lloberas el Terrassa kaj Albert Stephan el Germanio atingis tro altan aĝon kaj ne sukcesis trovi anstataŭantojn, malgraŭ iliaj klopodoj. Ili finas la ĉefartikolon per la jena adiaŭo: " Ni esperu, ke la politikistoj, la homoj trovos vojon por ĉesi la malsaton, kverelojn kaj militojn ĉie en la mondo. La vivo povas esti pli bona, kiam homo respektas alian homon."

BOSNIA LILIO

Aperis la gazeto n-ro 3 de ELBkH (E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino) kun 20 paĝoj en formato DIN A-4 kaj enhavo varia kaj interesa, kiun ni legis kun granda ĝuo. Sekvas resumo per kiu ni celas vekti vian intereson pri ĝi.

La komenca ĉefartikolo celas elstarigi ĉefe la interhoman solidarecon kaj resume raportas pri la tuta enhavo.

Artikolo titolita *Interreligia dialogo* de Mustafa Resulovic, pritraktas la fondiĝon en 1997 de Interreligia Konsilio kun reprezentantoj de kvar religiaj komunumoj en Bosnio-Hercegovino kiuj aprobis Deklaron pri kuna morala engaĝiĝo. Ili ankaŭ eldonis glosaron de religiaj nocioj el la kvar koncernaj religioj. Emfazindas ke Sarajevo estis dum jarcentoj ekzemplo de kunvivado, toleremo kaj reciproka respektado de diversecoj kaj ĝi estas nur paradigmo de la tuta Bosnio. La artikolo finiĝas jene: "La agado de la Interreligia Konsilio kaj la eldona agado ĉi-kampa atestas pri similecoj kaj malsamecoj, pri fundamentoj de la kunvivado kaj de komuneco en diverseco. Ĝi povas servi ankaŭ kiel valora sperto por aliaj specifaj kaj kompleksaj ŝtatoj kaj sociaj komunajoj en la mondo".

La Pontoj de Amikeco estas raporto pri la Festivalo Bretonio-Gorazde, enkadre de la bretona kunlaboro kun Bosnio. Tiun kunlaboron pritraktas ankaŭ la artikolo *Rompi Izolecon* de Josette Ducloyer.

Dupaĝa raporto informas pri la projekto "1000 familiaj pakaĵoj" lanĉita de HO Espero Bosnio kiu celis doni urĝan helpon al familioj de rifuĝintoj en Bosnio (pli ol 30.000 albanoj kaj 20.000 bosnoj el Serbio) al kiu tuj aliĝis la ĝemela organizo el Katalunio kiu sukcesis varbi subtenon de Kataluna Fonduso kaj de komunumo Castellbisbal, krome aliĝis ankaŭ E-Kultur-Centro de Tuluzo (Okcitanio) kaj aliaj kunlaborantoj. Finfine ne nur 1000 pakaĵojn, sed 2.025 oni povis distribui, kio estis la plej granda kampanjo kiun HO Espero realigis en 1999. La raporto finiĝas jene: "Ĝi ankoraŭ pruvis sian agadkapablon kiam plej bezonate-kaze de grandaj katastrofoj kiuj trafas ordinarajn homojn, ĝi manifestis ke homa solidareco ne havas limojn kaj ke esperantistoj kaj ties strukturoj-surprize efike-povas partopreni en tio."

Pri militkrimoj temas la artikolo *Hago-Metropolo de Justico*, kun aldonaj tekstoj pri la mondkampanjo *Savu Homecon* inter kiuj kvin fondintoj troviĝas ELBkH kaj korŝiraj atestoj de familianoj de viktimoj dum militaj.

Dupaĝa artikolo de Senad Colic pritraktas la Kvindekjaran Jubileon de ELBkH kiu fongiĝis en 1949, organizis la 16-an Jugoslavian E-Kongreson en 1955 kaj la 29-an IJK de TEJO en 1973. En 1974 komenciĝas dua periodo. Se la unuan periodon karakterizis movada idealismo, en tiu ĉi periodo kiun regis moderna agadkoncepto al la idealismo aldoniĝis efika pragmatismo. La Ligo fine de la 90-aj jaroj havis 10.000 membrojn kaj preskaŭ 100 aktivajn societojn, klubojn, lerneajn sekciojn kaj fakajn organizojn. La artikolo finiĝas jene: Nun post 50 jaroj de la agado de ELBkH en stato de gravega vundito troviĝas antaŭ nova komenco, sed ŝajne multe pli malfacila ol en la momento de ĝia fondiĝo. En ĉirkaŭa socio en kiu prioritato trudiĝas resaniĝo de soci-ekonomia vivo, reprivatigo de ekonomio, la Ligo devus redifini sian agadstrategion kaj adekvate formuli siajn agadprogramojn. Tempo por celebrado aŭ nostalgio ne plu estas. La ELBkH kvazaŭ troviĝas antaŭ mistera "blurivero", kaj ... "transriveren ni do devas", kiel mesaĝis bosnia poeto.

Kompletigas la gazeton raporto pri la 55-a IJK al kiu partoprenis 16 gejunuloj bosniaj; *Novaĵoj el la movado* kun diversaj informoj; Beletraj paĝoj ĉi-foje rilate la modernan bosnian verkiston Nedžad Ibrisimovic; Nekrologo pri la heroa morto dum milita de junaj esperantistaj fratoj Jusupovic kaj historia paĝo pri *La Ĉarto de Banuso Kulin*.

Tute intence ni lasis por la fino la mencion de artikolo pri movada strategio *Partopreni en eventoj* verkita de Senad Colic, ĉar pro ĝia intereso ni elektis por nia forumo.

RECENZOJ

ĈARMA VERKO

La verko de la kanada esperantistino Betty Salt transportas nin al frua epoko, eble al tiu de Marjorie Boulton, almenaŭ laŭ la stilo. Simpla Esperanto, malabundo de neologismoj kaj facilaj tamen lertaj, elturniĝoj.

Jam ekde la unua paĝo la leganto perceptos la libreton ideala por komencantoj, ĉefe la unuan parton. Temas pri mallongaj rakontoj distraj kaj amuzaj, dividitaj en kvar fakojn: rakontoj, teatraĵetoj, poemoj kaj tradukaĵoj.

La fonto estas ege diversaj sed la ĝenerala sento estas ke la talento de Salt kuŝas en ŝiaj oreloj. Ili funkcias kvazaŭ sonbendigilo, ĝis la punkto ke la libro facile povus titoliĝi **Mi aŭdis ke...**

Legante la libron oni imagas al si la aŭtorinon oldulino sidanta, iom flegme sed milde, ĉe ronda tableto, trinkanta tason da teo kun aliaj eksfraŭlinoj, atenta al ne ĉiam ordinaraj rakontoj de ŝiaj amikinoj.

Ĝuste tian scenon ŝi pritraktas en la rakonto *Forturnita Embaraso*.

Tie kaj alitie Salt avertas, ke la koncerna rakonto eble vi jam konis per aliaj homoj aŭ medioj. Tio ŝajne veras ĉar, de tempo al tempo, io en la historietoj tiklas nian (parapsikan) memoron.

Lito Apud Fenestro estas aparte rekomendinda por tiuj homoj kiuj ŝatas (aŭ nur povas) legi surtrajne aŭ neceseje ĉar ja neniu ĉapitro vere longas. *Veraj Rakontoj de Instruistino* posedas la rekordon : 9 paĝoj! Kaj ĝi estas dividita en 12 subĉapitroj!

Nu, kiel oni diras en la librodorso, entute ĝi estas senpretenda kaj ĉarma verko.

Carles Berga

Lito Apud Fenestro de Betty Salt-UEA, Roterdamo 1999- 108 p. 21 cm. –750 p-toj

Nova Ret-kurso

En nia lasta revuo n-ro 310 marto 2000, aperis recenzo pri la nova ret-kurso de ILEI-Cat pretigita de nia aktivulo Pedro Martin, kiu rekomendas jenan alian TTT-ejon : <http://www.xtec.es/~pmarti10/ilei-cat.htm>

Insula kvaro Revinda

Jen la titolo de 24-paĝa broŝuro pri la Kanarioj, kiu ankaŭ povus titoliĝi *Kvar Revindaj Insuloj*. Ĝi rilatas al la kvar ĉefaj insuloj nome Tenerife, La Palma, La Gomera kaj El Hierro. Bele tutkolora presita broŝuro en formato DIN-A-5 kun dulingva teksto en la hispana kaj Esperanto kaj mirinda frontpaĝo.

Jen atingo de la tiea esperantistaro, kiujn ni devas tutkore gratuli.

La broŝuro troviĝas en nia biblioteko por ĉies konsulto.

LIBROSERVO

Nia membro Josep Ferrer el Barcelono, mem eldonis tre interesan serion da movadaj kajeroj kun aldona kasedo, pri la jenaj temoj:

1.-Kantu Esperante (Infanoj ĉirkaŭ la mondo)

2.-Kiel pereis la familio de D-ro Zamenhof (kun omaĝo al M.Sárossy, Verda Kabaredo kaj Verda Koro)

3.-Internacia Elparolo (Prononcinstrua legado. Kantoj:forvojaĝa kanto)

4.-1-a Universala Kongreso de Esperanto (Voĉo de L.L.Zamenhof. La neforgesebla kongreso. "Preĝo sub la verda standardo")

5.- 5-a Universala Kongreso de Esperanto. Barcelono 1909. "Mistero de Doloro" de Adrià Gual. Salutparoladeto al la barcelonaj esperantistoj (la propra voĉo de L.L.Zamenhof)

6.- 39-a Universala Kongreso de Esperanto. (La kultura valoro de la internacia lingvo kun la voĉo de Prof.D-ro Ivo Lapenna)

7.- 49-a Universala Kongreso de Esperanto (Jaro de Internacia kunlaboro kun la voĉo de Prof.D-ro Ivo Lapenna)

8.- 50-a Libro-Tago. Decembro 1999 (Prelego de Gabriel Mora i Arana, grava kataluna poeto kaj esperantisto)

9.- Esperantologio .-Prelego de Petro Nuez

(Ĉiuj titoloj aĉetebraj en nia Libroservo po 800 p-toj la kompleto –kajero+kasedo-)